

Aŭstraliaj Esperantistoj

Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale
PLENUMITA 08/10/2020 Kvarcentnaŭdeknaŭa eldono (unua eldono 20/09/2011)



Subtenu vian Novajleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

Uzindaj ligoj [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)

[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo entute](#) [lingvohelpilo](#)

[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#)

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au



Entute **747,200** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **288,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **225,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **212,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

Nun studas **22,200** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020)

Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde februaro 2020 ?)



Post unu semajno la 500a eldono estos elsendota.


Skribu al AE dum ĉi tiu grava tempo.

Roger Springer



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

EKSTRAĴOJ ĈE LECIONO 5 DE "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).



N.ro 5 de "Por Komencantoj".



En Esperanto kaj en la angla lingvo oni faris kaj faras el vortoj aliajn vortojn en la jenaj manieroj. En la angla: Oni povas iomete ŝanĝi la radikon de la vorto, ekz. el de la substantivo "food" oni faris la verbon "feed". En Esperanto oni ne povas fari tion, ĉar oni ne rajtas ŝanĝi iun ajn radikon. Anstataŭe oni ŝanĝas la kategorian finaĵon, kiun la angla ne havas, aŭ malmulte. Ekz. el de la verbo "ridi" oni faras la substantivon "rido" (*laughter*). Ambaŭ lingvoj faras novajn vortojn per prefiksoj kaj per sufiksoj, ekz. "sana" >malsana = *healthy>unhealthy (sick)*. Tria maniero por krei novan vorton estas kunlui du substantivojn, ekz. el *cloth for the table* (tuko por la tablo) venas *tablecloth* (tablotuko). En

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

tiaj kunmetoj oni unue mencias la substantivan radikon (tabl) de la prepozitivo (for the table, por la tablo) kaj la kunmeto finiĝas per la ĉefelemento (cloth; tuko).

Por la du signifoj "he came back = li venis returne" kaj "he came again = li venis refoje" Zamenhof kreis, imitante la francan lingvon, nur unu afikson, do reveni kaj reveni. Multaj Esperantistoj faras la diferencon per nove kreita prefikso "retro", do "he came again = li revenis" (li ne loĝas ĉi tie) kaj "he came back = li retrovenis" (li loĝas ĉi tie).

(daŭrigota) Marcel Leereveld.



Surhavu vizaĝmaskon.

Unu terno povas elŝpruci ĝis 8 metroj.

<https://twitter.com/i/status/1245591199034929153>

Homoj protektas aliulojn per la surporto de masko

Protektilo por la surportanto sed ankaŭ por la proksimuloj

Memoru Donald! Roger Springer



La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo, kunvenas je 10.30 atm ĝis 12tm ĉe la una kaj tria sabatoj de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.

Ni renkontas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Whitewater, Suda Stejno. La ĉeestantoj tie diskutas la plej sekuran lokon por la kunveno laŭ la vetero kaj homamasoj

La 3a de oktobro estis la unua sabato. Venis Chris Holliss, John Casey, Roger Springer kaj Ian Wylles.

Roger Springer



Vizaĝmasko

La franca Esperanto-kastelo produktigis sian propran maskon por uzado en siaj kursaroj

Eblas mendi ilin kontraŭ 9 eŭroj (15 Aŭ\$), petante al kastelo@gresillon.org

La surskribo instigos homojn demandi pri la signifo, do informi pri Esperanto.

Bert Ŝuman



Julian Assange rimarkas, ke en la pasintaj 50 jaroj ĉiuj militoj ne okazus se la amaskomunikiloj ne tute subtenus la propagandojn por ke la militoj okazu.



Ne savu la firmaojn, sed savu la homojn.

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Socialismo estas impostmono uzata por helpi homojn ne malsatmorti
 Kapitalismaj firmaoj nun bezonas impostmonon aŭ ili malsukcesos.
 Mi kredas ke feliĉaj, ne malsataj aŭ ensklavigitaj homoj estas bonaj celoj.

Universala baza enspezo (UBI)



Tio helpas solvi ekonomiajn problemojn de la nuna mondo

La kovid 19 mondo bezonas novan ekonomian sistemon

La monda problemo ne estas krei aĵon sed kiel doni al la homaro la eblecon havi parton de tiu riĉeco. Mono estas la homa metodo por dividi la haveblan energion en la mondo.

Kion vi opinias?

Roger Springer



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

Kial ne perfektemi ?



KIAL NE ?

Mi petas al la plej perfektemaj Esperanto-gramatikistoj respondi al mia ĉi suba demando:
 Ĉar Zamenhof deklaris (en L.R. n.ro 114) ke

ĉar sufikso de participo havas ideon de konkreteco ĉe la ago,
 kaj ĉar tial la substantivigo de la ago esprimas nur konkretaĵon,
 kaj ke preskaŭ ĉiam nur ulo estas la aganto,
 tial , laŭ la principo de sufiĉo,

TIAL NI NE BEZONAS ALDONI LA SUFIKSON “-ULO” ,
 kaj en la maloftaj kazoj aldonas “-aĵo”-n.

K I A L ni ne povas same deklari, kiel konvencion, ke
 ĉar sufikso de participo havas ideon de KAJ tempo KAJ
 g r a m a t i k a voĉo,

kaj ĉar tial verbigo de la participo kaŭzus du tempojn ,
 ke ĉe la verbo “-ati” ni ne bezonas indiki la tempon ,

kiu nature enestas en la finaĵo, ni tial deklaras,

KE NUR “-AT-” , KAJ UZATA NUR KIEL VERBO,
 PERDAS SIAN SIGNIFON DE TEMPO ,

kaj tiel kreas la en la Zamenhof’a Esperanto ne ekzistantan Verban Pasivan Voĉon.

Marcel Leereveld.

KIAL JES ?

En unu el siaj lastaj kunvenoj de la Lingva Komitato por diskuti la Pasivan Voĉon en Esperanto, Kalocsay fine elkriis: “Do Esperanto tute ne havas verban pasivan voĉon !”. Kaj oni ne kapablis solvi tiun problemon.

Oni ne povas diri, ke “estis –ita” estu la nuntempa pasiva voĉo, ĉar ĝi jam estas la Pluskvamperfekto, kiun oni de tempo al tempo bezonas uzi.

Cetere, same kiel la Aktiva Voĉo (“La viro batis”), la Pasiva Voĉo logike devas konsisti el unu vorto (“La hundo batatis”), ĉar okazis nur unu ago.

Marcel Leereveld.

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

KIAL NE JES ?

Anstataŭ la Zamenhof'a klarigo kial substantiva participo indikas nur personon, nome ke la konvencio estas ke substantiva participo perdas sian signifon de aĵo kaj eco kaj retenas nur la signifon de persono, en tiu kazo la konvencio povas esti, ke ĉe verba Pasiva Participo la sufikso "ati" perdas sian signifon de tempo (aŭ imperfekto) kaj retenas nur la signifon de pasiveco. **M.L.**

GRATULOJN KAJ DANKOJN .

Post unu semajno eldonatos la duonmila numero de "Aŭstraliaj Esperantistoj", semajna Esperanto-gazeto naskiĝinta pro "milito" inter la du partoj de la aŭstraliaj Esperantistoj ne povantaj tiam pace labori kune. Ĝi celis kunigi per neŭtrala gazeto la individuojn de la du kontraŭantaj grupoj, simple per neoficiala gazeto. Sed ĝi baldaŭ fariĝis neŭtrala internacia informgazeto, kaj ĝi ne uzatis de la du militantaj kampoj por daŭrigi sian malamikecon; aperis en ĝi nur kelkfojaj referencoj ne por inciti. Ĝia enhavo estis kaj estas tre varia, kaj krom la informoj el la lokaj Esperanto-grupoj ĝiaj artikoloj temis kaj temas ne nur pri Esperanto ĝenerale, sed ankaŭ pri ĉiuj ordinaraj flankoj de la vivo de homoj, nome politikaj, ekonomiaj, sciencaj kaj kulturaj. En tiu senco ĝi estas unika regula gazeto, la sola de sia speco, post la morto de la longtempa aperado de la francuje eldonita monata gazeto "Laŭte!", simila al A.-E. La elstarajoj de A.-E. estas, ke ĝi jam vivis tiom longe, ke ĝi eldonatas, sen interrompo, ĉiusemajne, kaj ke ĝi havas riĉan varian enhavon. Kaj ĉio pro la persistemo kaj idealismo de unu homo, Roger Springer, kvankam li havis la fideblan helpon de Vera, de Franciska, kaj de Bob. Kaj ankaŭ la regulajn enhavokontribuojn de kelkaj aliaj homoj. Mi esperas ke Roger povos persisti ankoraŭ plurajn jarojn.



Persone mi volas danki Roger pro alia karakterajo de A.-E., nome ke la redaktoro ne cenzuras mian gramatikon nek mian stilon, sed nur la enhavon de miaj kelkfoje tro akraj kritikoj. En la lasta kazo li simple "forĝegas" publikigi miajn akraĵojn, sen diri tion al mi, kvankam tio tre malofte okazas. Sed li neniam cenzuras mian gramatikon, eĉ ne pere de Vera aŭ Franciska, ĉar li ne volas esti tiom malmodesta kiom aliaj redaktoroj kiuj juĝas sin aŭ siajn helpantojn cenzurpovaj pri mia gramatiko. Ankaŭ Kribo, tre klera Esperantisto kaj la redaktoro de "Laŭte!", neniam ŝanĝis mian gramatikon. Pro tiu malmastremo de Roger eblis al mi publikigi grandegan kvanton de duonsciencaj artikoloj pri lingvismo, kaj mi do estas tre danka al li pro tio.

Bedaŭrinde mi ne povos, pro mia aĝo, partopreni en la mila numero de A.-E., sed esperas ke nova Esperantisto aperos por science daŭrigi la laboron por teni Esperanton gramatike preskaŭperfekta. **Marcel Leereveld.**

POTENCO DE LA ŜTATO .

Estas vera, ke la registaro de Ĉinujo havas grandegan potencon kaj rigide traktas homojn kiujn ĝi juĝas danĝeraj por Ĉinujo, sed mi trovas similajn kazojn en t.n. demokrataj landoj. Mi memoras kiel antaŭ multaj jaroj melburna konstrukompanio faris kelkajn gravajn erarojn dum

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

sia konstruado de granda ponto, tiel ke dum la konstruado la ponto rompiĝis kaj mortigis la laboristojn sur tiu falanta parto. Tuj la registaro ordonis la gazetaron ne menci tiujn erarojn, por savi la kompanion potenca. Nur eksterlandaj gazetoj publikigis la veron, ĉar la registaro ne kapablis cenzuri tiujn. Kaj la kompanio aĉetis la silenton de la familianoj de la akcidentviktimoj. Iu simila okazis en mia regiono, kie komenciĝis granda arbarfajro, kiu mortigis dek-unu fajristojn de la Landfajraŭtoritato. Tuj dum la fajro la registaro ekfunkciigis esploriston por trovi la komencanton de la fajro. Ĉiutage li publikigis la rezultojn de la esplorado, ĝis li menciis ke li trovis la krimulon. Sed tuj poste li ne plu publikigis la rezultojn de la esploroj. Kial ne? Sendube ĉar ĝin komencis la loka fajrobrigado kiu sendube volis plezurigi iun farmiston kiu bezonis la fajron. Sed anstataŭ resti apud la tereno de la farmisto, la fajro disiĝis al granda spaco bezonante multajn fajrobrigadojn. La registaro neniam informis nin pri kiu starigis la fajron. La gazetoj silentis pri tio. Simila silentado okazis en Ĉinujo ĉe la komenciĝo de la koronaviruso.

Marcel Leereveld.



Mortinta aŭ vivanta

Profito, profito kaj profito super ĉio.



Ni vivas en mondo, en kiu arbo valoras pli, finance, mortinta ol vivanta. Mondo en kiu baleno valoras pli mortinta ol vivanta.

Dum nia ekonomio funkcias tiel, kaj kompanioj ne estas kontrolataj, ili daŭre detruos arbojn, mortigos balenojn, ekspluatos la teron kaj daŭre eliros petrolon el la tero, kvankam ni scias ke tio detruas la planedon kaj ni scias, ke ĝi forlasos pli malbonan mondon por estontaj generacioj.



Nun ĉio devas rezulti en profito. Kio okazos se la savado de la mondo ne havos profiton? **Roger S**



By Chen Hong Source: Global Times Published: 2020/9/28 23:53:40



Kelkaj faras ĉion por sia amiko


Kiu helpas la vundotan kanguruon? La amiko ??

Mi ĉiam kredas kiam inteligenta disputo ŝanĝiĝas al fizika batalo ke la celo ne estas kiu pravas sed kiu estas plej forta

Ĝis nun mi neniam havis fizikan batalon. Mi havas 89 jarojn sed eble en la estonto mi havos tian situacion ?

Ne mordu la manon kiu manĝigas vin. **RogerSpringer**

Illustration: Liu Rui CT



3ZZZ

En la elsendo de la 5a de oktobro Carlo Minnaja priskribas sian infanaĝon kiel denaska esperantisto . Vi ekscios kial vi dormas kaj komprenos kial estas malfacile trovi solvon kontentigan al ĉiuj rilate geografiajn kaj proprajn nomojn



Franciska Toubale

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE



UNIwersYTET
IM. ADAMA MICKIEWICZA
W POZNANIU

5-a INTERLINGVISTIKA SIMPOZIO | 5th INTERLINGUISTICS SYMPOSIUM | 5. SYMPOZJUM INTERLINGWISTYCZNE

Rolo de lingvoj en interkultura komunikado | The role of languages in intercultural communication

Rola języków w komunikacji międzykulturowej



300 partoprenintoj por lingvistika simpozio

La 5a Interlingvistika Simpozio kun titolo «Rolo de lingvoj en interkultura komunikado» okazis en septembro 2020 en virtuala formo kun rekorda nombro da partoprenantoj (pli ol 300 el pli ol 50 landoj) kaj preskaŭ 60 prelegoj en 3 lingvoj (Esperanto, angla k pola).

La programo, resumoj kaj raporto legeblas ĉe:

Informis **Katja Steele**

<http://interl.home.amu.edu.pl/interlingvistiko/simpozio2020.html>



Indrani translokiĝis

Antau unu semajno mi translokiĝis. (mi volis malgrandigi mian loĝ-domon, ago nomata en la angla "downsizing")

Kiel vi povas imagi krom la mebloj mi havis multege da skatoloj kun diversaj aĵoj sur kiuj oni notas la enhavon.

Estis multaj skatoloj sur kiuj mi skribis - Esperanto kaj poste (angle) :libroj au ĵurnaloj ktp.

Unu transloĝigisto demandis min - kion signifas Esperanto?- Antaŭ ol mi povis respondi, la alia transloĝigisto diris - tio kompreneble estas ŝia familia nomo!

Do, ĉu mi nun povos prezenti min kiel posteulino de Doktoro Esperanto?!

Cetere kiam mi klarigis kio estas Esperanto ili tute NE interesiĝis pri tio.

Indrani Beharrylall



Venonta Semajno AE 500 estos elsendata

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE